



CGC Nº
00406 504/1000-06

Conselho Brasileiro de Esperanto

BRASÍLIA – DISTRITO FEDERAL
Sede: Edifício Jockey Clube, sala 103
Setor Comercial Sul

REDAÇÃO E PRESIDÊNCIA
Rua Galeão Carvalhal, 31 – AP. 73
Telefone 4-8033
11.100 – Santos (SP)

SECRETARIA
Caixa Postal 07 – 1182
Telefone 226-1298
70.000 – Brasília (DF)

(Correspondência para a redação: endereço acima)

MAIO DE 1981

ÓRGÃO OFICIAL DO BKE

BOLETIM Nº 61

REDAÇÃO: MARIA ALMADA

66-A UNIVERSALA KONGRESO

La L.K.K. informas, ke "La solena inaŭguro de la 66-a UK okazos en la Nacia Teatro de Brazilio, kiu havas sufiĉe da sidlokoj".

Komuna loĝejo estos disponebla al la kongresanoj nur dum la periodo 25-07-81 ĝis la 1-a-08-81. Ĝi ne akceptas nek traktas mendojn por loĝado for de tiu periodo. La entrepreno Johnson & Johnson do Nordeste S.A. donacis Cr\$ 20.000,00 por helpi la infankongreseton kaj promesis donacojn aliajn al la plej junaj kongresanoj. La Kompanio VASP transportos senpage materialon por la L.K.K., donacos paperujojn kaj insignojn al ĉiu kongresano. VASP estas nia enlanda transport-kompanio. Ĉiu kongresano utiligu VASP por vojaĝi al Brazilio! Pro la granda materiala helpo de Brazilia Konsilantaro de Esperanto al la kongreso-Komitato la estraro de UEA decidis kompensi la diversajn elspezojn ĉiumonatajn de BKE per pago de 1.500,00 guldenoj. La L.K.K. bezonas ĉiaspecajn helpojn kaj jam agadas helpata de volontuloj. La juna samideano Lourenço R. Sogabe, el San-Paŭlo, dum unu tuta semajno laboris en la sidejo de la L.K.K. helpantefraŭlinon Neima Adorno kaj Carlos A.S. Cunha kun granda sindono kaj kompetenteco. Tiu, kiu volos imiti ilian ekzemplon estos bonvena. Ek al Brazilio!

U.E.A.

S-ro Simo Milojević, redaktoro de "Esperanto", informas nin, ke jam ekspe-dis grandan kvanton da bonegaj kaj ĉe ni ne konataj esperantaj libroj. Dum la UK ĉiu partoprenonto povos akiri ilin. Estos la unika oportuneco, ke la latinamerikanoj havos okazon vidi la valorajn mondel-donaĵojn de UEA.

La libroservo disponos pri ĉirkaŭ 2400 volumoj, ĉiuj akireblaj.

Certe la latinamerikaj eldonejoj aperiros kun siaj ofertoj al la kongresanoj. Tra-rigardu ni niajn bretojn kaj planu ni anticipi la aĉeton de utilaj libroj, kiujn ofertos la 66-a UK.

II-A KONGRESO DE BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO

Kiel ni jam anoncis, en nia I. Bulteno pasinta, la II-a Kongreso de BKE okazos de la 31-a de oktobro venonta ĝis la 2-a de novembro de 1981-a. La prezidantino de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo informis nin ke, la 4-an de aprilo, 1981, je peto de la prezidanto de BKE, s-ro F. S. Almada, la direktoraro de EASP - Esperanto-Asocio de San-Paŭlo akceptis la taskon organizi la eventon en tiu progresema urbo, kion la prezidanto de BKE tre dankas.

Dum la okazigo de tiu kongreso estos elektota nova estraro, kiu certe daŭrigos la laboron diligente por la bono de la Esperanto-movado en Brazilo.

LA ESPERANTO-MOVADO TRA BRAZILIO

FORTALEZA (CE) — Nia vicprezidanto, D-ro Prof-ro Cesar Barros Leal, profesoro ĉe "Casa de Cultura Hispanica da Universidade Federal do Ceará" publikigis libron pri hispana lingvo "Lengua Española", kiu estas bone ricevata de la publiko.

Li estas esperantisto de sia junaĝo kaj jam gvidis plurajn Esperanto-kursojn. Es-tante advokato kaj ĵurnalisto li multe laboras en Fortaleza. Ni gratulas lin kaj deziras sukceson ankaŭ disvastigante la Internacian Lingvon.

RECIFE (PE)

En la ĉefurbo de la ŝtato Pernambuco la movado estas bona. Pluraj kompetentaj esperantistoj agadas tie. La prezidanto de la Pernambuka Esperanto-Asocio, prof-ro J. M. Mabesoone, estos unu el la prelegontoj de la 66-a UK. Li estas bona kaj dinamika esperantisto kaj lia prelego estos, certe unu el la plej interesaj. La 25-an de aprilo estis elektita nova direktoraro, por la periodo 1981 ĝis 1983, informis nin s-ano Amaro Pinangé Soares, vicprezidanto de la asocio kaj de BKE. La nova estraro estas: Prezidanto: - J.M. Mabesoone; vicprezidanto: Amaro Pinangé Soares; ĝen. sekretario: - Jorge de Oliveira Melo; 2-a sekretario: Amílcar de Souza Leão; kasistino: Maria José Pontes; 2 - sekretario: Severina Pereira; Bibliotekistino: Sonia Calado. Konsilantoj: Arnon Ribeiro Vasconcelos, Geraldo Pires Sitônio, pstro José Nogueira Machado, Jayme Andrade kaj Ubiraci Silva Barbosa.

Ni deziras prosperon al la novaj respondeculoj.

SALVADOR (BA)

En tiu fama urbo la nombro de la inter-

teresatoj por lerni la internacian lingvon kreskas. La Bahia Esperanto-Societo pligrandigis la nombron de la instruistoj kaj nun gvidas kurson tie s-roj Albenio Lima da Silva kaj Jether Jorge Pinho Miranda inter aliaj. Sam-no Raymundo José Pitanga Rocha diplomigis ĉe la medicina fakultato la 1-an de januaro 1981-a. Ĉe estis lian feston multaj esperantistoj. Post la diplomigo li militservas en la enlanda urbo Paulo Afonso. Sam-no Rocha instruis Esperanton en Salvador kaj nun intencas organizi studrondon en Paulo Afonso, kie li nun loĝas. Kun sincero ni gratulas la novan kuraciston kaj deziras al li plenan sukceson. Ni dankas la informojn al sam-no Sergio Luiz Silva Santos, nia vicprezidanto, kiu kun granda grupo de samideanoj partoprenos la 66-an UKn.

BELO HORIZONTE (MG)

D-ro Helio Aderne, antaŭ lo jaroj fondis en B. Horizonte klinikon, kies nomo estas "Clinica Esperanto". Nia s-ano estas bonkora kaj humana persono kaj multe helpas la malriĉulojn en tiu loko. Dum tiuj 10 jaroj de ekzisto de la kliniko d-ro Aderne malgrandigis la suferon de multaj malsanuloj. Ni deziras daŭran sukcesan laboron al li kaj, ke aliaj esperantistoj sekvu lian ekzemplon. Gratulon.

NI KONDOLENCAS

En Belo Horizonte, komence de la jaro, mortis granda batalanto por nia idealo, generalo Geraldo Padua. Bone konata kaj estimata esperantisto li estis kaj gvidis multajn kursojn en tiu urbo kaj aliloke. Pluraj bonaj esperantistoj lernis la internacian lingvon de li. Li verkis vortaron Portugala-Esperantan kaj surbendigis prononcon de esperanta lingvo.

Ni kondolencas la familion.

NOVA FRIBURGO (RJ)

La Unua Tutlanda Esperantista Junulara kunveno okazis en tiu montara urbo de la 17-a ĝis la 19-a de aprilo, 1981. La

junularo pritraktis la organizadon de ŝtataj junularaj grupoj. Pluraj interesaj prelegoj okazis dum la renkontiĝo. Inter aliaj prelegis prof-ro José Passini, vicprezidanto de BKE kaj membro de la Kultura Asocio de Esperanto en Juiz de Fora (MG), kun granda sukceso. Temis pri ankoraŭ unu junulara renkontiĝo en nia lando.

Prof-ro Passini estos unu el la naciaj prelegantoj dum la 66-a UK. Lidonosrapidan kurson pri portugala lingvo kaj kiu interesiĝos lerni plibone la nacian lingvon havos bonan okazon. Mi ĉeestos.

RIO DE JANEIRO (RJ)

Atingis nian redakcion la ĉirkulero de S-ano Amarílio Hevia Carvalho, el Rio de Janeiro, kies enhavo traktas la dissendon de la propaganda materialo de L.K.K. Ĉar la poŝtarifoj ege altiĝis, la dissendado de interesaj propagandiloj iĝis tre malfacila. S-ano Amarílio, kiel ĝisosta esperantisto senpage helpas L.K.K. en Rio de Janeiro, sed bezonas monhelpon por la elsendado de la propagandiloj.

Estas petate al ĉiuj bonkoruloj helpi, eĉ per etaj sumoj, sendante adresojn de gazetoj, ktp. Tiu, kiu povos helpu, bonvole, al la diligenta vicprezidanto de BKE. Lia adreso estas: Amarílio Hevia Carvalho - Caixa Postal N^o 1.107 - CEP - 20.000 - Rio de Janeiro (RJ). Koran dankon al ĉiuj, kiuj helpos kaj kunlaboros por la sukceso de nia 66-a UK. Ek al Brazilio!

SPIRITA ELDONA SOCIETO — "F. V. LORENZ" — Caixa Postal N^o 3.133 — CEP 20.000 — Rio de Janeiro (RJ). Tiu Eldona Societo posedas diversajn eksterlandajn verkojn, krom de ĝi eldonitajn. Inter ili troviĝas la ĵus aperinta "Almanako Lorenz". Tiu ĉi verko estas eksterordinare interesa por ĉiaspecaj legantoj. La Societo "F.V.Lorenz" petas ĉies opinion pri la verko. La libroj estas akireblaj je la supra adreso. Legu ni pli! Esperanto estas kulturo.

ASOCIO ESPERANTISTA RIO DE JANEIRO

En ĉiuj grandurboj estas eble organizi plurajn asociojn. En Rio de Janeiro jam ekzistas diversaj organizaĵoj, kiuj propagandas kaj instruas la internacian lingvon. Estas kurioza la fakto, ke nian redakcion atingis leteroj kaj telefonvokoj el Rio demandante kie oni povas lerni Esperanton...

Oni estas studanta kie estus eble restarigi la malnova societon A.E.R.J. Okazis konferenco tiurilate la 22-an de majo, 1981.

VOLTA REDONDA (RJ)

Nia vicprezidanto, D-ro Alberto Flores, informas nin, ke la Siderurgia Kompanio el tiu urbo reeldonis la ilustritan broŝuron pri la Nacia Siderurgia Kompanio. Dum la Latinamerika Kongreso, okazinta en Marilla, estis disdonitaj tiaj bele ilustritaj broŝuroj al kongresanoj, kiuj multe laŭdis la bonajn esperantaj klariĝojn kaj enhavajn informojn.

D-ro Flores pere de sia dediĉa laboro kaj propagando, sukcesis, ke la Kompanio aliffoje disdonu al la Kongresanoj, nun de la 66-a UK, tiun altvaloran broŝuron. Li ricevis pli ol 3000 ekzemplerojn, kiujn li sendis al L.K.K. Krom tiu sukceso, D-ro Flores gvidas kursojn pri la internacia lingvo ĉe la Fakultato en Volta Redonda, en oficiala karaktero.

La loka gazeto "Sul do Estado" aperigas regule interesajn artikolojn pri Esperanto kun apogo de la direktorino S-ino Heth Lustosa da Cunha Bastos. Nur dum la jaro 1980-a la gazeto publikigis 31 artikolojn pri nia movado.

En la Spiritisma Centro "Caminho da Luz", okazas kursoj de Esperanto kaj krom D-ro Flores instruas la studentoj Marcos Baylão kaj Luciano C. Pereira. Tiu ĉi verkas artikolojn por la gazeto "Sul do Estado". Li estas unu el niaj fortoj. S-ano Alberto Flores estas esperantisto, kiu kun amo sin dediĉas al nia movado en Brazilo.

Pere de nemezurebla pacienco amo al Esperanto-movado, li laboras senĉese kaj estas kontenta nur kiam la afero bone marŝas. Li estas unu el tiuj samideanoj, en kies vejnoj fluas ne ruĝa sed verda sango. Ni lin gratulas kaj "Antaŭen! la nepoj vin benos se vi paciencie eltenos".

NITEROI (RJ)

La prezidanto de Niteroi Esperanto-Klubo, D-ro Joaquim do Couto informas nin, ke en tiu urbo la klubanoj kunvenas ĉiusabate kun intenco praktikadi la internacian lingvon, kio ja estas tre laŭdina kaj imitinda.

Tie okazas elementaj kursoj por pari neesperantistojn por la 66-a UK. Ili estas farataj ĉe la Strato Coronel Gomes Machado, 140 - 3a. etaĝo, kun prof-ino Balbina Ferreira.

Oni eldonis tre belajn propagandilojn pri turismo kaj inter aliaj estas informiloj. La turisma agentejo presigis tiajn informdokumentojn por la Esperantokursoj. Bonega laboro de D-ro Couto kaj klubanoj. Gratulon!

GOIANIA (GO)

La Gojana Instituto de Esperanto plene funkcias nuntempe. En "Ed. Banco Mercantil do Brasil", ĉe Avenida Goiás, 636 - sala 104.

Ek de februaro S-ino Hebe C. Gonçalves instruas la internacian lingvon al komencantoj. La kurson vizitas 15 glerantoj, laŭ informo donita de Francisco Rodrigues de Moraes Sobrinho, granda batalanto de nia afero, nuntempe en tiu urbo. Li estas vera idealisto kaj kun propraj rimedoj subtenas tie la grupon. Same li respondecas pri la restarigo de la sidejo kaj de la movado en Goiânia.

Jam de longe ni ne aŭdis ion ajn pri la laboro de la esperantistoj tie, sed dank' al la sindediĉo de nia vicprezidanto Moraes Sobrinho, Goiânia revigliĝas. Lia laboro estas laŭdina kaj imitinda.

BAURU (SP)

Oni daŭrigas la lampanĵon por propra sidejo en Bauru. Kiu deziras helpi al la bauruanoj, ne hezitu, ĉiu kontribuaĵo estos bonvena. La prezidanto de la societo, Euclides Geraldís de Carvalho konstante propagandas kaj gvidas kursojn pri Esperanto kune kun pluraj klubanoj. Oni bone disvastigas la internacian lingvon ĉe la turisma agentejo, inter la skoltajn kaj en la tuta regiono. Li sugestas, ke ĉiu persono, kiu skribas al ili volu afranki la leterojn pere de memorpoŝtmarkoj, ĉar la bonaj poŝtmarkoj havas valoron ĉe la filatelistoj kaj helpas al nia movado. Ankaŭ, kiu volos sendi al ili poŝtmarkojn la bauruanoj danke akceptas.

SOROCABA (SP)

Sano Eluizio Bueno Rodrigues sugestas, ke la L.K.K. klopodu organizi meson dum la 66-a UK kaj ke ĝin la radio kaj TV diskonigu al la publiko. La 23-an de majo festis sian datrevenon la Sorokaba Esperanto-Klubo. Tre bela estas la laboro de la klubanoj tie, kiuj kun granda sukceso senĉese propagandas pri Esperanto pere de la loka radio. Nuntempe elstarigas la s-roj Manoel Blaz Garcia kaj Eluizio B. Rodrigues per siaj klopodoj kaj sukcesoj. Ili bezonas ĉies helpon por aĉeti proprajn sidejojn. La Klubo eldonas interesan informilon, kiu elstarigas la societon, kaj ni deziras plenan sukceson al niaj gesamideanoj el Sorocaba.

CAÇAPAVA (SP)

Okaze de la 126-a datreveno de la urbo sano Majoro Gilberto A. Velho, nia vicprezidanto, eluzis la festenon por propagandi pri Esperanto. Li organizis belan ekspozicion per esperantaĵoj, montrante al neesperantistoj kio estas la internacia lingvo.

Prof-ino Elvira Fontes, prezidantino de Esperanta Asocio de San-Paŭlo faris festparoladon kaj klarigon pri Esperanto-

movado en nia lando kaj parolis pri la 66-a UK, okazonta en Brazilio ĉijare.

Dudek lernantinoj kantis en Esperanto dum la evento.

S-ano Silva Velho organizis kurson, instruante plurajn interesatojn al 66-a UK, por ke ili povu paroli dum la partopreno de la kongreso. Li daŭre kunlaboras kun diversaj gazetoj tra la tuta regiono.

CAMPINAS (SP)

Campinas, kie iam jomenciĝis la Esperanto-movado en nia lando, kaj eldonis la unuan informilon pri la internacia lingvo en Brazilo, sub la titolo "Suda Stelaro", longe dormadis kaj ne aktivis ... sed la disĵetitaj semoj restis kaj nuntempe ĝermas, vigiĝas.

Kekkaj junuloj el aliaj urboj ekstudis tie ĉe la fakultato kaj ekpropagandis pri Esperanto, kaj tuj aperis alia idealisto al kiu aliĝis novaj interesatoj, kio bone efikis. La rezultato estas, ke tie okazis la 7-a Regiona Renkontiĝo de Esperanto organizita de AESP - Asocio - Esperanto de San-Paŭlo. Multaj eminentaj esperantistoj ĉeestis ĝin, el diversaj partoj de la lando, kaj en la "Salão Vermelho" de la urbestrejo estis okazigita la renkontiĝo.

Inter la ĉeestintoj estis nia vicprezidanto Manoel Blaz Garcia, el Sorocaba, kiu raportis por nia bulteno la informojn, kiujn ni publikigas.

Li menciis, ke nuntempe ĉe diversaj universitatoj la internacia lingvo estas lernata (PUC, UNICAMP kaj Spiritista Societo "Alan Kardek") de 115 gelernantoj.

Pluraj kompetentaj esperantistoj prelegis: Prof-ro Walter Francini, Prof-ro Euclides Carneiro, el Mogi das Cruzes, Prof-ro Ivon Barbosa kaj aliaj.

Estis lanĉita broŝuro pri "Kunmetitaj Verboj per sufikso UM" de la Prof-ro Carneiro.

S-ano Silva Velho organizis tie ekspozicion. El diversaj urboj ĉeestis gejunuloj kaj faris rimarkindan programon.

La ĉefdelegito de UEA, Giuseppe

Grattapaglia, faris specialan inviton al ĉiuj ĉeestantoj partopreni la 66-an UK-on. Ĉiuj menciitaj elstaraj esperantistoj estas vicprezidantoj de BKE.

Sam-ino Elvira Fontes, prezidantino de AESP, disdonis librojn propagandcele. La direktoro de la eldona societo "Waldomiro Lorenz", s-ro Delio Pereira de Souza, reprezentis la societon. D-ro Manoel Torres de Abreu, el Rio Grande-RS, same riĉigis la eventon pere de sia ĉeesto, kiel bona batalanto por nia afero. Ni deziras progreson al junuloj el Campinas, kie la movado okazis-as-os. Antaŭen! Al nia kara raportisto Manoel Blaz Garcia ni kore dankas la informojn; ili estas tre valoraj kaj kuraĝigaj! Certe ni ĉiuj aperos en Brazilio por la 66-a UK.

GUARULHOS (SP)

En ĉi tiu urbo diligente agadas kaj instruas la lingvon D-ro Lacorday Andrade. Li gvidas diversajn kursojn preparante novajn esperantistojn kaj planas grupe aperi en Brazilio okaze de la 66-a UK. Li propagandas pere de gazetoj, radio kaj persone. Enskribiĝis pli ol 50 personoj por la kursoj en Guarulhos. Estas notinda lia agado en la urbo. "Diário de Guarulhos" kaj a "Folha Metropolitana" aperigas artikolojn pri Esperanto fare de D-ro Lacorday.

SÃO PAULO (SP)

La AESP serioze sin preparas por ĉeesti la 66-an UK-on. La prezidantino kaj ŝiaj helpantoj gvidas plurajn kursojn celante helpi la interesatojn al UK, eĉ per korespondado oni instruas la Internacian Lingvon. Elvira Fontes verkas kutime artikolojn por la gazeto "Diário Popular" kaj s-ano Deodato F. Melo verkas por aliaj gazetoj entuziasmigante la legantaron. La "Jornal dos Professores", ankaŭ el San-Paŭlo, aperigas artikolojn verka-tajn de Prof-ro Walter Francini. Li skribas serion da artikoloj karigante al la neesperantistoj la valoron de Esperanto kaj ĝian gravecon en la erao de komuni-

kado en kiu ni vivas nuntempe.

Prof-ro Francini eldonigis du bonajn librojn: "Esperanto sem Preconceitos" kaj "D-ro Zamenhof", bone akceptitaj de la legantoj. La interesatoj pri tiuj libroj povos ilin akiri ĉe nia redakcio aŭ ĉe la sidejo de BKE - SCS - Ed. Jockey Club, sala 103 aŭ Caixa Postal 04-0406-70.000 - Brazilio (FD).

MOGI DAS CRUZES (SP)

Laste aperis interesa broŝuro pri la Kunmetitaj verboj per sufikso "UM", de prof-ro Euclides Carneiro da Silva. Vere estas interesa kaj utila laboro de prof-ro Silva, ĉar elmontras la riĉecon de nia lingvo kaj kiu deziras ĝin pli profunde ellerni nun havas okazon tion fari. La broŝuron ni traegis kun granda plezuro kaj tuj lernis kelkajn verbojn, kiujn oni uzas kun sufikso "UM". Butikumi, amindumi, okulumi ktp. Kiu deziras helpi al la profesoro Carneiro, sendante al li novajn kunmetitaĵojn volu fari tion je adreso: Associação Mogiana de Esperanto "AME". R. Cap. Paulino Freire, 366 - 08700 - Mogi das Cruzes (SP).

PORTO ALEGRE (RS)

La ESPA - Esperanto - Societo de Porto Alegre, okaze de sia datrevemo, la 2-an de aprilo, 1981, elektis novan estraron. Fariĝis ĝia prezidanto D-ro Ivo Sanguinetti ticevinte la malfacilan kaj respondecan taskon de D-ro Ernani Dias Correia, kiu prezidis la societon dum 22 jaroj. Jen la nuna estraro: "Prez.: Ark. Ivo Sanguinetti; vicprezidanto: D-ro Modesto Belmonte de Abreu; 1-a sekretario: - Carlos Henrique Dionísio; 2-a sekrt.: Nestor Lellis; Kasisto: - Wenceslau Gonçalves; Bibliotekisto: - D-ro Alcides Leivas Cardia. Konsilantoj: - Prof-ro Zeluhy Seleme, Dorval Pereira da Silva kaj Julião Rodrigues de Moura. Ni deziras al nova direktoraro plenan sukceson en ĝia administrado.

ESPA festis sian 36-an datrevenon kaj la anaro tiam enpostenigis la novan estraron. La festo komenciĝis per riĉa vespermanĝo. La nova direktoraro aten-

das seriozan taskon, sed jam ekagis. D-ro Ivo Sanguinetti, prezidanto de la societo preparas grupon de gujunuloj, kiuj partoprenos la 66-an UKon, kaj faras bonegan propagandon pri ĝi. Li tradukis kaj komponis muzikojn, kiuj estos kantotaj en Esperanto dum la UK. Estos ĉimarona rondo kaj klarigoj pri la gaŭĉaj moroj. S-ro Ery Asenato, folkloro instruisto jam lernigas entuziasme la junulgrupon. Krom kanti ili deklamos, muzikos kaj dancos. La grupo entuziasmiĝis kaj kreskas, sed mankas mono por prepari specialajn vestojn, vojaĝeblecojn, ktp. La nova prezidanto nun faras la eblon havigi la rimedojn kaj petas ĉies helpon. Certe tiun problemon oni solvos kaj la mondo ĝuos la eksterordinaran belecon de la moroj gaŭĉaj. Dum la "verdkafa" renkontiĝo la esperantistoj disdonados propagandilojn al la publiko. Ni ĉiujantaŭĝojas renkonti niajn bonajn geamikojn el Rio Grande do Sul en Brazilio.

PELOTAS (RS)

Nia vicprezidanto Paulo Domingues M. Caruso ankaŭ multe laboras en Pelotas. Li verkas artikolojn por la loka gazeto "Diário da Manhã", apogata de la ĵurnalisto Helio Freitas. La adreso de tiu gazeto: Rua Andrade Neves, 2143 - CEP 96100 - Pelotas (RS). Oni petas al la esperantistaro skribi al tiu sinjoro dankleteron pro lia apogo al nia samideano Caruso. En lia artikolo oni informas pri la ekzisto de Esperanto-kurso en la "Colegio Santa Margarida", ĉiumerkrede je la 20-a horo kaj 30 minutoj. Antaŭen, kara s-ano!

NI GRATULAS

Alvenis letero de s-ino Heliana Correia Barrocas, el Monte-video (Urugvajo) sciigante nin, ke la cikonio vizitis ilian hejmon kaj naskiĝis ilia, unua filo Heliberto Barrocas Correia, la 26-an de marto. Ni gratulas al la feliĉaj gepatroj kaj senpacience atendas, en Brazilio plej junan kongresanon. Bonvenon!

BRAZILIO (FD) — 19-A Internacia Infankongreseto

Kadre de la 66-A U.K. okazonta en Brazilio de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 1981, la infanoj de 06 ĝis la 13-a jaro kunsidos en nia ĉefurbo, kaj por tio ili nur pagos 70 guldenojn kun rajto al gastigo kun manĝo dum la periodo. Tiuj infanoj tamen devas paroli Esperanton flue, kondiĉo postulata. Tiaj kongresetoj okazas ofte dum la U.K. kaj ni esperas, ke nun en nia lando ĝi estu ankaŭ impona. La programo estas tre varia kaj ĉio estas preparata por plenumi la temon disponitan. Pluraj entreprenoj, same kiel Johnson & Johnson, Kibon, Nestlé, Ktp. jam eksendadas dekojn da produktoj por disdoni al infanaro ĉeestonta. Kunportu ni niajn infanojn al U.K.66-A!!

La aliĝilojn oni mendu al L.K.K. laŭ la adreso: SCS Ed. Jockey Club - Pŝkesto 04-0406 - Tel. 061:226-1298 - BR - 70.000 - Brasília (DF).

LINGVA PRIKOMENTO

D.W. Argentino

Aforismoj - La vera amo pretendas nenion krom ami. La animo ne havas sekson. - La amo naskas la ĵaluzon kaj la ĵaluzo mortigas la amon. La malamikeco ĉiam estas sincera, sed la amikeco ne ĉiam estas same klara. Kiam oni fartas bone, oni estas juna. Kiam oni ne fartas bone, oni estas maljuna.

Eterna malcerteco - La serpentego renkontis leporon en la ĝangalo, kaj ekĝojis pro la hazarda bonŝanco. Kaj diris en si: "Kia manĝaĵo por mi!" Kaj bonhumoris jene: "Eta leporo! Kiel vi fartas? ... Hm ... Kiel vi fartas, kara leporo? Ĝi ĉirĵaŭprenis, ludeme ekvolvis ĝin en la herbo kaj de vorto ĝis plando ĉirkaŭsalivumis ĝin. La leporo kapturniĝis pro la honorige afabla akcepto. - Mi volus nur scii - ĝi eksuspiris glitante malsupren tra la faŭko de la serpentego - ĉu vere amas min tiu ĉi besto aŭ nur flatas ... ?

Nun la Prikomento - Oni konsideru mian viziton kiel respondo al via demando. La vorto "respondo" devas havi la akuzativan finaĵon, ĉar ĝi dependas same kiel la vorto "vizito" de la transitiva verbo "konsideri". Do, korekte: "oni konsideru mian viziton kiel respondon al via demando".

Ne dubu, sed agu kvazaŭ vi tenus la taskon kiel via devo. Ankaŭ tie ĉi la vortoj "via devo" devas havi la akuzativan finaĵon, ĉar ili dependas same kiel la vorto "tasko" de la transitiva verbo "teni". Do, korekte: "Ne dubu sed agu kvazaŭ vi tenus la taskon kiel vian devon".

MONO RICEVITA POR LA SIDEJO

De la ĵeanaĵi ni ricevis la subajn sumojn:

Eugenio Doin Vieira	2.000,00
Edson da Costa Ribeiro . . .	1.500,00
José Paulino Alves	10.000,00
Ary Zamora	2.000,00
Maximiliano O. Silva	10.000,00
Wanderley F. Gonçalves . . .	10.000,00
Balbina Pereira	2.000,00
Jayme Andrade	10.000,00
D-ro Joaquim do Couto . . .	10.000,00
Sumo	Cr\$ 57.500,00

VOLAS KORESPONDADI

Instruisto el Ĉekoslovakio serĉas korespondantojn por siaj ĝelernantoj, pri variaj temoj: ŝanĝo de bildkaraj, filatelio, kaktokolekton, ktp. Adreso: Ing. HLA-DIK - Jaroslav - 671-61 - PROSIMEŘICE - 162 - CSSR - TCHECOSLOVAKIA.

MONO RICEVITA POR LA BULTENO

Ni ricevis de la jenaj ĝeamikoj kaj dankas:

De Claudio Zimmermann . . .	200,00
Manoel Moacir Ciscati	300,00
Itamar Batista de Castro . . .	500,00
Maximiliano de O. e Silva . . .	100,00
Balbina Ferreira	300,00
Francisco R.M. Sobrinho . . .	182,00
Prof-ro J.M. Mabesoone . . .	500,00
Amaro Pinangé Soares	400,00

Maria José Pontes	300,00
Arnon R. Vasconcelos	200,00
Jorge Luiz de O. Melo	100,00
Bauru Esperanto-Societo	200,00
Yolanda de A. Costa	500,00
Eluizio B. Rodrigues	200,00
Delio Pereira de Souza	1.000,00
Luiz P. Menechino	1.000,00
D-ro Wilson Deslandes	1.000,00
Euclides Geraldís Carvalho	300,00

KARA PATRINO!

En neatendita sunsubiro, mi troviĝas sola. La malhelaj pezaj nuboj rulas super mia kapo. La sablo sub miaj piedoj dissaltas timeme. La mistera, mara akvotimige minacas min pere de ĝia nemezurebla forto. La lasta sunbrilo kisas la akvon kaj poste tuj malaperas en la malhelon. Mi estas sola en tiu senfina naturo. Neniu troviĝas apud mi: Nek homoj, nek birdoj, nek la luno kaj ankaŭ vi troviĝas malproksime de mi.

Mi intendas miajn manojn al vi, sed ili restas malplenaj. Estas nokto-estas malhelo, nur. Mi diras al Vi: Patrino mi amas vin. Mian voĉon forpelas la vespera vento kaj ruligas ĝin super la maro. Vi tion nek vidas nek aŭdas. Inter ni regas granda nenio. En tiu vakuo perdiĝas amo kaj saŭdado, sentoj kiujn ni ne plu povas doni unu al la alia. Patrino mi amas vin, mi bezonas vin, mi serĉas vin. Pro via foriro, mi iĝis soleca, kiel falinta frukto sub la arbo, kiel seka folio, kiun malprossimen pelis la vento.

Volu dirial mi, kie troviĝas la gusta vojo, kiu kondukus min el tiu soleco? Mi emas flugi kun la birdoj, tra la kampoj kaj montoj. Eble la vento atingos vin kaj vi aŭdos mian susuron.

En mi regas muta sulento, kiu ŝiras mian animon. Ĉu vi vidas min Patrino? Ŝajnas, ke mi iradas super ŝnurego, minacita fali ĉiumomente. Mi serĉas viajn manojn, kiuj apogus min. Vane! Vi ne plu estas apud mi. Mi sentas min fremdulo en tiu arbaro, kiu nomigas vivo. Mi ŝatus meti mian mienon sur viaj manplatoj, sed mi scias, ke vi estas neatingebla. Mia malforta voĉo ne atingas vin, sed sciu kara Patrino, ke mi ĉiam amis kaj amas vin el fundo de mia koro. Via M.

GAZETOJ RICEVITAJ

Sei, Correio Fraterno do ABC, Tribuna Guarulhense, A Caminho da Luz, Folha de Caçapava, Diário da Manhã, Kvake-ra Esperantisto, ZET, el Jugoslavio, Sviza Fervojisto, Gazeta da Bahia, A Candeia, Suda Stelo, Semanario, Folha Metropolitana, Sul do Estado, Correio Popular, Diário de Taubaté, O Tambau, AGIG, SEK, O Liedes, O Fluminense.

BARRA MANSA (RJ)

En Barra Mansa, BAMEK estas en plena aktiveco. La Gazeto de tiu urbo aperigis la bilancon de BAMEK de la jaro 1980-a. Estas menciinda la regula agado de la familio Deslandes en tiu urbo. Okazas kursoj por komencantoj kaj la societanoj sinpreparas vojaĝi al Brazilo, por la 66-a UK.